

poste turnis sin denove al la Gliro kaj ripetis la demandon :

“ Pro kio ili loĝis en la putfundo ? ”

Jam la duan fojon la Gliro bezonis duminutan konsideradon ; fine li diris : “ La puto estis melasa puto.”

“ Neeble, ne ekzistas tiaĵo ” Alicia komencis tre indigne. Sed la Ĉapelisto kaj la Martleporo ambaŭ sible admonis ŝin per Ŝ— ! Ŝ— ! kaj la Gliro mem per ofendita voĉo minacis ŝin, dirante :

“ Se vi ne kapablas kondukti ĝentile, vi devas mem fini la fabelon.”

“ Ho, volu daŭrigi, mi petegas ” Alicia ekkriis. “ Mi ne ree interrompos vin ; eble ekzistas *unu*.”

“ Vi kredas ke nur unu ? ” la Gliro indigne ekkriis. Tamen li konsentis daŭrigi.

“ Do, tiuj tri fratinetoj—ili ja lernis la desegnartron—”

“ Kion ili desegnis ? ” diris Alicia, jam forge-sinte sian promeson.

Ĉi tiun fojon eĉ ne unu momenton la Gliro konsideris.

“ Melason ” li diris.

— “ Mi bezonas puran tason ” interrompis la Ĉapelisto. “ Ni ĉiuj movu nin maldekstren je unu sidloko.”

Li movis sin laŭ la diro ; lin sekvis la Gliro,

kaj la Martleporo translokgigis de la Gliro. Alicia, ne tre v antaŭan lokon de la Martleporo ja profitis nur la Ĉapelisto, kaj la Martleporo ĵus antaŭ la translokgigado laktokruĉon en sian teleron, kaj Alicia profitis.—

Ĉar ŝi ne volis reofendi la Gliro, ŝi tre singarde :

“ Mi ne komprenas. De kie vi trovas melason ? ”

“ Oni povas ĉerpi¹ akvon de la Ĉapelisto klarigis “do egalas (t.e. desegni) melason el melasoj (t.e. malklera bubineto) ? ”

Alicio pro lia malĝentileco interrompis la Ĉapeliston : al la Gliro ŝi diris :

“ Sed ili ja vivis en la puto.”

“ Vivis en la puto ? Certegaj, sed *la puto* ja malsukcesus desegni ĝi ! ” La Gliro, dirante tion, trovis vokalojn, kaj iom kunligis apud la parolmaniero de kelkaj antaŭaj la lingvon en tre malmoderna maniero.

Alicio tiel konfuziĝis per la ĉi tiu dum kelka tempo, ŝi lasis al la Ĉapelisto rompe daŭrigi la rakonton.

¹ la sama angla vorto “*draw*” havas la signifon kaj “ĉerpi.”